# KIAL MI STUDAS ESPERANTON

Antaŭnelonge, iu demandis min pri kial mi studas esperanton dum ekzistas tiom multe da premaj mondaj problemoj. Ĉu esperanto vere pli gravas ol la barakto por la homaj rajtoj aŭ la protekto de la medio? Eble ne. Tamen, mi opinias, ke nia sola espero
por solvi tiujn kaj aliajn premajn terglobajn problemojn estas rekoni ties universalan karakteron, klopodi por interkultura kompreno, kaj kune labori kiel unu popolo por solvi tiujn. La komunikado, en formo de lingvo internacia, estas necesega por tiu celo.

Oni ne scias pri kiel homa lingvo komencis, sed la plejparto de lingvistoj ŝajnas konsenti, ke kunlaborado estis la bazo: homoj komunikas por ke ili laboru kune al komuna celo. Ĉiu generacio havis pli kaj pli grandan aron da samlaboranojn por kunlabori, ne nur samtempanojn, sed pli grave, pasintajn vojaĝintojn kiuj lasis al ni siajn skribaĵojn aŭ ĉizaĵojn. Ni, kiel individuoj, kiel usonanoj, kiel amerikanoj, kiel membroj de la monda socio, staras ĉe la sojo de ekhavo de tutmonda socio, kaj esperanto povos esti la paŝo kiu portos nin transen. Lingvo estas nur la unua, kaj probable la plej malgranda obstaklo kiu baras al ni la vojon. Lerni iun ajn lingvon, speciale esperanton, facilas kompare al preterpasi rasan kaj etnan antaŭjuĝon, religian malamon, kaj kulturan luktadon. Lerni esperanton do, estus benega unua paŝo permesanta neŭtralan komunikadon inter irlandanoj kaj angloj, isrealanoj kaj araboj, aŭ eĉ etnaj kalifornianoj kaj etnaj vaŝintonanoj.

Kleruloj opinias, ke ni preterpasas la epokon de nacio-ŝtata superregado, kaj ĝuste kiel la federacia polic-oficiro iam enkarceris banditojn, tiel same la Uniĝintaj Nacioj, la Monda Juĝejo, kaj aliaj internaciaj organizaĵoj malhelpos la agojn de malsociaj landoj. Eŭropo jam faris la unuan al hegemonio kondukantan paŝon. (Kaj kelkaj eble dirus la duan kaj trian, ankaŭ.) Se esperanto akceptiĝus, tio certe plirapidigus tiun proceson kiu jam komenciĝis. Ju pli baldaŭ ni ĉiuj havos komunan duan lingvon, des pli rapide ni povos komenci solvi la restaĵon de la premaj problemoj kiujn ni ĉiuj alfrontas.